



**3(171)  
2019**

# Apudvistula Bulteno

**de Krakova Societo ESPERANTO**

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 30-510 KRAKÓW

Krzysztof Kamil Baczyński (1921-1944)

trad. Lidia Ligeża

## Sur le pont d'Avignon

Ten wiersz jest żyłką słoneczną na ścianie  
jak fotografia wszystkich wiosen.

Kantyczki deszczu wam przyniosę –  
wyblakłe nutki w nieba dzwon  
jak wody wiatrem oddychanie.

Tańczą panowie niewidzialni  
„na moście w Awinion”.

Zielone staroświeckie granie  
jak anemiczne pączki ciszy.

Odetchnij drzewem, to usłyszysz  
jak promień – naprężony ton,  
jak na najcieńszej wiatru gamie

tańczą liściaste suknie panien  
„na moście w Awinion”.

W drzewach, w zielonych okien ramie  
przez widma miast – srebrzysty gotyk.

Wirują ptaki płowozłote  
jak lutnie, co uciekły z rąk.

W lasach zielonych – białe łanie  
uchodzą w coraz cichszy taniec.

Tańczą panowie, tańczą panie  
„na moście w Awinion”.

## Sur le pont d'Avignon

Ĉi poem' jene suna strio mure,  
foto de ĉiuj primaveroj.

Kantikojn pluvajn mi oferos –  
palnotojn por spac-orkestrion'  
kiel akv-ventan spir-susuron.

Dancas sinjoroj nevideblaj  
„sur pont' en Avinjon”.

Ekmoda, verda akompano  
– feblaj burĝonoj de silento.

Ekspiru arbe kaj atentu:  
kiel radi' streĉita ton',

kaj sur subtila venta gamo  
dancas foliaj roboj, damoj  
„sur pont' en Avinjon”.

En arboj – verda fenestr-framo,  
trans urb-fantomoj gotikstilaj  
kirliĝas birdoj orsimilaj,

liutoj ĉi fuĝintaj for.

En arbar' verda blankcervinoj  
Fuĝas en softan danc-fascinon.

Dancas sinjoroj, dancas damoj  
„sur pont' en Avinjon”.

Jerzy Broszkiewicz

**fragmentoj el la libro Malgranda spiritisma seanco**

## **Malkovro**

Surbaze de multjara studado, komparativaj esploroj, analitikaj kaj normigaj (aplikante egale indukton kaj dedukton) mi akiris neskeueblan konvinkon, ke sur la centra insulo de la Metorrdandino-Arkipelago vivas tribo, kiu subtenas ne nur la praktikon, sed ankaŭ teknikon mumiigi de tasmaniaj kapĉasistoj.

Ĉi afero sur la areo de la menciita arkipelago formas fenomenon tiel esceptan, ke eĉ absurdan. Nenio stranga, ke anoncata de mi tezo "Pri ligoj etno-antropo-kulturaj de Tasmanio kun centro de Metorrdandino-Arkipelago en aspekto de mumiigi kapojn" renkontiĝis kun malestima mutio de grandaj aŭtoritatoj, moko de diletantoj, ignorantoj kaj gnomoj.

Kiel mi povis agi! Mi homo malriĉa, sed riĉa pro amo al sciencaj esploroj? Mi agis kiel decisi! Laŭ mia propra elspezo mi organizis ekspedicion. Kaj malgraŭ malhomaj penoj – neglektante perdon de la administrulo, eskapon de du helpantoj, morton de gvidanto kaj ĉiujn portistojn por sep mejloj antaŭ la celo – mi atingis finfine kaŝitan en altmontara valo paradizon. Afero nekredebla! La vero montriĝis senkompare pli interesa ol miaj la plej strangaj supozoj. Ĉar ĉi tiu milda, plenigita de amo al mondnaturo kaj homnaturo, la tribo (sub la influo de la arda predikado de devojiĝinta en ĉi tiun regionon misiisto) forlasis la mornajn praktikojn de kapĉasistoj. Tamen, rezulte de tute misformita interpreto de la scienco "pri la konsumado de karno kaj sango", homareto tiu konvertiĝis je kanibalismo, kion mi povis konstati private kaj persone.

Pro tia kaŭzo ne sukcesis al mi ĝis nun doni al publika informo menciitajn de mi faktojn.

tradukis: Marta Michałowska

Lidia Ligęza

## **La multsignifa arbusteto visko**

Komplikigitaj kaj ne ĝisfine klarigitaj ligoj de la norvega dio Balduro kun visko (*Viscum album* L.) okupis la esencan lokon en ceremonioj de la germana mitologio.

Balduro, filo de la granda dio Odino kaj diino Freja, zorganto pri bono, belo, justeco kaj printempo estadis inter ĉielo kaj tero, en palaco, en kiu daŭris la eterna amuzo. Laŭ Eddo – malnov-islanda libreto ampleksanta aron de mitoj, legendoj kaj sentencoj rilatantaj al kredoj skandinavaj kaj germanaj (ĉirkaŭ 1220 j.) li estis mortigita de dio Loki per lanco el visko. Ĝi estis unusola kreskaĵo, pri kiu forgesis diino Freja akceptante ĵuron de ĉiuj bestoj, arboj kaj arbustoj, ke ili ne faros maljustaĵon al ŝia filo. Kadavron de Balduro oni bruligis sur ŝtiparo pretigita sur lia ŝipo. Multaj ceremonioj de fajro celebrataj de druidoj ligiĝis kun ĉi tiu evento.

Granda sanktejo de Balduro troviĝis en Norvegio, ĉe unu el golfoj de fjordo Sogne. Oni nomis ĝin Bosko de Balduro. Troviĝis tie statuoj de multaj dioj, sed Balduro ricevadis la plej grandan kulon. Oni skulptis lin kun branĉeto de visko.

Esploristoj de la temo fiksas identecon de Balduro kun kverko. Kverko – sankta arbo de tempesto, fajro, senmorteco kaj forto perdante vintre foliojn konservis sian forton (animon) en vivanta, verda visko. Fortranĉante viskon oni detruis ceremonie vivon de la arbo kaj elpaŝanta sub

ĝia aspekto dio. Nomo de la keltaj sacerdotoj – druidoĵ devenas ĝuste de kverko (lat. druides, druidae) kaj substrekas gravecon de tiu arbo.

De nememorebla tempo visko estis objekto de estimo en la tuta Eŭropo. Verkis pri tio Plinio la Pli Maljuna +71 j. menciante eĉ diversajn ĝiajn specojn kaj raportante observojn rimarkitajn en Galio: "En okuloj de druidoĵ [...] ne estas io pli sankta ol visko kaj arbo, sur kiu ĝi kreskas, kondiĉe ke ĝi estas kverko. [...] Ĉar ili kredas, ke ĉio kio kreskas sur ĉi tiu arbo, estas sendita el ĉielo kaj estas signo, ke ĉi arbon elektis la dio mem. Rare okazadas sur ĝi visko, sed kiam ili ĝin trovas, deprenas ĝin tre solene. [...] Post ĝustaj preparoj al la ofero kaj festeno sub la arbo, ili laŭdas ĝin kiel saniganton. [...] Sacerdoto en blanka vesto ascendas la arbon kaj per ora serpo fortranĉas viskon, kiun kolektas en blanka tolo. [...] Ili kredas, ke trinkaĵo preparita el visko kaŭzos fekundecon de bestoj kaj ke ĉi kreskaĵo estas medikamento kontraŭ ĉiuj venenoj." Visko kverka povis kuraci epilepsion kaj helpi al virinoĵ, kiuj volis gravediĝi.

Nuntempaj Ajnoj (Japanio) simile kiel druidoĵ opinias, ke visko estas kuracilo kontraŭ multaj malsanoĵ kaj kontraŭ malfekundeco. Slavoĵ, precipe poloj kaj blankrusoĵ aplikis viskon pro multaj malsanoĵ kaj por bonŝance bredi abeloĵn. Sub Płock oni kredis, ke paro, kiu rendezuas sub visko certe geedziĝos.

Herbario de Marteno el Urzędów (XVI jarĉ.) enhavas informon, ke "tataroĵ kaj rusoj tion observas, ke kiam viskon prenas, tiam ĝin per fero ne tuŝas, permane ne prenas, antaŭ ol de la arbo descendos, teron al ĝi tuŝi ne permesas, tiel dirante, ke ĝi tiam konservas forton sian, kiun havas por helpi al homa sano". Ni konstatas ĉi tie la saman zorgon kiel ĉe druidoĵ, por ne ofendi la sanktan kreaĵon tranĉante ĝin per fero.

Blankrusoĵ kaj loĝantoĵ de Polesie aplikas dekokton el visko kontraŭ pliko polonika. En okcidenta Pollando oni kuracis plikon portante sur la kapo branĉetoĵn de visko. En Balkanoĵ kaj en Bulgario branĉetoĵ de tiu sankta herbo oni pendigas sub plafono de kabanooĵ por certigi al si sanon; beroĵn de ĝi utiligas virinoĵ kontraŭ senfekundeco.

Simboliko ligita kun visko ampleksas multe da aferoĵ, kiuj ŝajne inter ili ne kuniĝas.

Visko simbolas **morton**, pri kio diras mito pri Balduro. Se oni hipotezas, ke Balduro estis personigo de la potenca kverko kaj visko konservis en si animon de kverko, oni ne povis lin mortigi ne fortranĉante viskon. Atestas pri tio ritoĵ de druidoĵ ilustrantaj dramon de ĉi evento.

Visko estas **dono de la ĉielo**. Laŭ praaj kredoĵ bato de tondro inokulas sur arbo viskon kaŭzante samtempe sanktigon de ĉi arbo.

Visko simbolas **senmortecon**, ĉar kreskas sen radikooĵ kaj restas eterne verda.

Ĝi estas do signo de **vivo**, **renaskiĝo** kaj **renoviĝo**, **talismano** protekta kontraŭ malbonaj spiritoĵ, **kuracilo** kontraŭ multaj malsanoĵ, **rimedo** por fekundeco.

Duoblaj folioĵ kaj beroĵ de visko montris similecon al stelaro de Ĝemeloĵ kaj al testikooĵ (testes). Visko estis genitalooĵ de kverko, kio ligiĝas kun fekundeco. Tranĉado de ĝi simbolis kastron de kverko, do kastron de patro, kiun faris la filo, kiel en greka mito pri Urano kaj Krono. Tio devis certigi fekundon.

Velkinta visko prenas oran koloron, do ĝi havis forton **trovi enterigitajn trezoroĵn**.

Visko instigas al **konkordo**, **pardono**, **amikaj sentooĵ**. Kutimo interkisi sub visko en tempo de Kristnasko estas restaĵo de malnovaj ritoĵ kunigitaj kun certigado de fekundo.

Sonĝo pri visko estas bona signo. Oni povos trapasadi kun proksimooĵ pli multe da tempo kaj montri al ili sentooĵn. Se dum la sonĝo ni ornamas la hejmon per visko – alproksimiĝas serio de la favoraj okazintaĵooĵ. Se ni plukas viskon – ni al streboĵ certigi bonstaton al la familio igos ĝian agnoskon.

Laŭ kartoĵ de Taroto visko estas simbolo de amo, ambicio kaj realigo de planooĵ. Ĝi rigardita sonĝe profetas sukceson en la amo, nupton aŭ malproksiman vojaĝon. Plukado de ĝi povas anonci naskiĝon de ido aŭ novan loĝejon. Se ni pendigas viskon – ni evitos malsanon kaj travivos la familian feliĉon.

## Grekaĵoj proverboj

elektis Nikos Chadzinikolau

La pura ĉielo tondrojn ne timas.  
Aglo muŝojn ne kaptas.  
Kiu postkuras venton estos de ĝi kaptota.  
Du kapoj ne povas troviĝi en unu ĉapo.  
Azenon oni aplaŭdas, kiam ĝi elvados el koto.  
Kato ŝatas fiŝojn, sed al akvo salti ne volas.  
De malbona barelo ne estos bona vino.  
Virino donas ĝojon, viro amaron trinkas.  
Instrumentoj la samaj, kvankam muzikantoj ŝanĝiĝas.  
Laboru por manĝi, kaj ŝtelu por havi.  
Ĉevalinon komence oni devas ekmanĝlati kaj poste maneĝi.  
Dum akvomanko kaj hajlo bona.  
Se hundino ne vostumus, hundoj post ĝi ne irus.  
Granda ekkuro, malgranda salto.  
Savu serpenton vintre, ĝi ekmordos vin somere.  
Birdo flugas alte, sed manĝon trovas sur la tero.  
Eĉ bona grundo, se kuŝas senkultive, naskas herbaĉojn.  
Tiu gratas sin, kiu havas ungojn.  
Se mi sciis, kiam mortos, mi ekfosus por si tombon.  
Klerulo havas tri okulojn, analfabeto unu, kaj aldone blindan.  
Hejmo sen libroj estas hejmo sen fenestroj.  
Bona vorto eĉ serpenton enkondukos el sia nesto.  
Kiu havas malbonan edzinon, en entombigoj ne devas partopreni.  
La mondo estas ŝtupetaro, tra kiu certaj ascendas, aliaj descendas.  
Pli bona unu okulo propra ol du fremdaj.  
Pli bone kun saĝulo plori, ol kun stultulo ridi.  
Pli facile malamikon venki, ol virinon konvinki.



### Krakova Societo ESPERANTO

#### La programo de la renkontoj aprile ĝis junio 2019 j.

- 4. 04. 2019 j. – Lidia Ligeza. Saĝo de la antikvaj grekoj. Aforismoj laŭ N. Chadzinikolau – p.1
- 11. 04. 2019 j. – Marta Michałowska. Etrakonto de J. Broszkiewicz „Lanugeto”
- 25. 04. 2019 j. – Grażyna Porada. Esperantaj lingvaj ludoj.
  
- 9. 05. 2019 j. – Lidia Ligeza. Saĝo de la antikvaj grekoj. Aforismoj laŭ N. Chadzinikolau – p.2
- 16. 05. 2019 j. – Marta Michałowska. Biblio. Dubindaj fragmentoj de zamenhofa traduko
- 23. 05. 2019 j. – Lidia Ligeza. Lingvaj humoraĵoj en versaĵetoj de Rejna de Jong
- 30. 05. 2019 j. – Grażyna Porada. Esperantaj lingvaj ludoj.
  
- 6. 06. 2019 j. – Maria Pawlikowska Jasnorzewska – POEMOJ esperantigitaj de Kazimierz Strzelecki
- 13. 06. 2019 j. – Grażyna Porada. Ekzercoj traduki polan proverbojn
- 27. 06. 2019 j. – Antaŭlibertempa societa renkonto. Bagatelaĵoj de Lidia Ligeza.